I. F. E. A.
ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO


# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071    REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 8 Aprile 1954

Il giorno precedente, sabato 25 settembre, i congressisti, in compagnia di un nutrito gruppo di samideani di Massa, dopo una bella gita in autobus a Portovenere con ritorno in vaporetto attraverso il meraviglioso golfo dei Poeti, si sono ritrovati nel bel salone della società corale di La Spezia, gentilmente concessa, per ascoltare le numerose romanze magistralmente cantate dal tenore Raul di Massa in Esperanto


Il giorno precedente sabato 25 settembre i congressisti in compagnia di un nutrito gruppo di samideani di Massa dopo una bella gita in autobus a Portovenere con ritorno in vaporetto attraverso il meraviglioso golfo dei poeti; si sono ritrovati nel bel salone della società corale di La Spezia, gentilmente concessa, per ascoltare le numerose romanze magistralmente cantate dal Tenore Raul di Massa in Esperanto.

## Al la estraroj kaj aktivuloj.

Kun la propono fari Sarlandon eŭropa ŝtato prezentiĝas bona okazo denove akcepti la taŭgecon de Esperanto kiel interpopola komprenilo.
Sarlanda fervoja esperantisto proponas al la IFEF-anoj partopreni tuteŭropan konferencon en Sarlando, por ke ni montru al la fervojistaj sindikatoj ke Esperanto bone taŭgas ne nur por trakti fervojajn problemojn sed ankaŭ por komuna eŭropa lingvo.
Nia amiko jam kontaktiĝis kun la Direkcio de la Sarlandaj fervojoj, kiu garantiis al li fervoran subtenon; la Direktoro mem pretas akcepti la honorprezidantecon. La fervojo jam promesis senkostan vojaĝbileton en tuta Sarlando al ĉiu aktive partoprenanta fervojisto.
Partoprenos ankaŭ la sindikatoj kaj oni klopodos ricevi financan subtenon de la registaro. Sendube tia renkontiĝo povos multe kontribui al la- en Sarlando tre malfacila varbado por Esperanto.
Ni do volonte presigus la aldonitan alvokon en Bulteno, se ni ne timus ke ĝi povos malfavore influi la partoprenon al nia kongreso en VERONA. Tial ni decidis rekte sendi al vi la koncernan tekston, por ke ni povu pritrakti ĝin en la estrara kaj delegitara kunveno en Verona.
Bonvolu do atente tralegi ĉisuban alvokon kaj pritrakti ĝin antaŭe en via estraro kune kun la kongresdelegito. Espereble nia Sarlanda amiko venos al Verona por doni pli detalajn informojn kaj por mem instigi al partopreno de tiu tuteŭropa konferenco. Se necese ni publikigos la alvokon en la Maja numero de BULTENO.

La IFEF-estraro.

## Alvoko al ĉiuj fervojistaj Esperantistoj en Eŭropo.

Karaj fervojistaj Esperantistoj.

Por aranĝi grandan tuteŭropan fervojistan renkontiĝon en Sarlando mi ŝatus scii la nombron kaj adresojn de ĉiuj partoprenontoj. Mi kontaktiĝis kun la Direkcio de la Sarlandaj fervojoj kaj ĝi certigis al mi fervoran subtenon. Ĝi donis al mi permeson doni al ĉiuj aktivaj partoprenontoj senkostajn biletojn por ĉiuj vojaĝoj dum la renkontiĝo en la tuta Sarlando sen krompagoj. Plue mi kredas, ke multe da partoprenontoj povos tranokti senkoste ĉe fervojistaj gekamaradoj. Eĉ estas eble, ke kelke da aliĝontoj ricevos senkostan manĝon.
Ni, eŭropaj fervojistoj kun la verda stelo, volas manifesti al la eŭropa publiko ke la internacia lingvo " ESPERANTO" bone taŭgas por trakti ĉiajn internaciajn problemojn kaj aparte taŭgas por la funkciado de internacia fervoj-trafiko.
Skribu baldaŭ per poŝtkarto ĉu eblos via partopreno kaj vian adreson, laŭeble ankaŭ la adresojn de aliaj fervojistaj gekolegoj, kiuj ne legis verŝajne tiun ĉi alvokon, kaj ŝatus partopreni.
Sciante proksimume la nombron de la partoprenontoj mi decidos pri la kunvenloko. Krome mi ŝatus scii, kiu povos fari referaton por tiu ĉi renkontiĝo. Se iu havos malfacilaĵojn por akiri senkostan bileton, skribu baldaŭ. Nur ni fervojistoj povas aranĝi tiom malmultekostan ~~KKK~~an renkontiĝon.
Tial kunhelpu por la sukceso kaj disvastiĝo de nia amata komuna lingvo ESPERANTO.
Kun la espero, ke mia alvoko estu ĉie favore aŭdata mi salutas vin kore.

Jen gekolegoj, serioze pritraktu ĉi tiun alvokon antaŭ la diskutoj en VERONA !

# DISSENDOJ EN ESPERANTO

## Majo 1954.a

405 merkredon, la 5.an - Novaĵoj el Italujo
406 vendredon, la 7.an - Florenca Muzika Majo
407 merkredon, la 12.an - La itala romanco kaj F. P. Tosti.
408 vendredon, la 14.an - Leterkesto kaj bibliografio
409 merkredon, la 19.an - Karl Vanselow, la verdstela trobadoro
410 vendredon, la 21.an - La tago de la bona volo
411 merkredon, la 26.an - La "Festo de la Grilo" kaj la "Ludo de la Ponto" en Toskanio
412 vendredon, la 28.an - Pri la VI Internacia Kongreso de Esperantistaj Fervojistoj

=======

## Junio 1954.a

413 merkredon, la 2.an - "Parolataj leteroj" (magnetofona registrado) Konversacio de S.ro B. S. Agren el Svedujo)
414 vendredon, la 4.an - Freŝdataj informaj dokumentoj pri Esperanto (prezentado de libro ĵus publikigita de Itala Esp-Federacio)
415 merkredon, la 9.an - Novaĵoj el Italujo
416 vendredon, la 11.an - Leterkesto kaj bibliografio
417 merkredon, la 16.an - Sankta Pio X.a kaj Esperanto
418 vendredon, la 18.an - Italaj belartaj urboj: Torino
419 merkredon, la 23.an - Siciliaj kanzonoj
420 vendredon, la 25.an - Angelo Poliziano, okaze de la V.a datreveno de la naskiĝ-tago
421 merkredon, la 30.an - "O-Tei" - japana legendo de Lafcadio Hearn, trad. de Hoiĉi Hiroŝi

=====

Prelegas: merkrede - S.ro Luigi Minnaja
" vendrede - Prof. D.ro Vincenzo Musella

======

La dissendoj okazas de h. 18,50 ĝis h. 19,10 (M.E.T.)
STACIOJ: metroj 31,35 = Mc/s 9,52; metroj 49,92 = Mc/s. 6,01

======

Esperantistoj posedantaj magnetofonan aparaton estas invitataj kunlabori en rubriko "PAROLATAJ LETEROJ" sendante fadenbobenon kun enparolita konversacio.
- La enhavo en perfekta Esperanto - La registrado teknike bonkvalita - La temoj plej variaj je internacia intereso (escepte politikaj argumentoj) - La daŭro de la prezentado 18 minuta. - Se necese petu klarigojn!
Tiamaniere Radio Roma disponigas siajn mikrofonojn al tutmonda esperantistaro . La Komisione senapelacie decidos ĉu la "parolata letero" estas inda je radio-dissendado. La kunlaboro estas senpaga. Kunlaboru! Jen la okazo por diri ion vere interesan pro kaj pri Esperanto aŭ pri io ajn aŭskultinda!

La Fakestro
A. Blasimme